

INFORMA

bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

MARTO-MAJO 1963

Numero 2 (64)



Tiu-ĉi numero, dediĉita al frateca Vjetnamio, estis eldonita en kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, en faka kunlaboro kun portanto de ordeno "Por eminenta laboro", kamarado Jaroslav Štěpánek.

ANTAŬ 18 JAROJ

Estas la 5-a de majo 1963. Stratoj kaj placoj de la ĉefurbo estas plenaj de tumulto kaj movo. Kaj tamen ekzistas lokoj, kie tumulto silentiĝas kaj ĉiu movo malrapidiĝas.

Sur centoj da lokoj en stratoj kaj sur placoj en Praha honorgardas ĉe monumentetoj kaj memortabuloj kaj knaboj kaj knabinoj en blankaj ĉemizoj kun ruĝaj koltukoj. Sur tiuj ĉi lokoj antaŭ 18 jaroj mortfalis herooj de revolucio.

Antaŭ 18 jaroj ...

En nebulan antaŭtagmezon pafeksonis fuŝiloj, aŭtomataj pafiloj kaj pistoloj, vibrosonegis eksplodoj de grenadoj kaj kanonoj, bruegis longaj salvoj de maŝinpafiloj. Praha, ombrumita en fumo de incendioj, venkobategis malamikon. Nura nokto sufiĉis por elkresko de barikadoj en la stratoj de la ĉefurbo, blokoj de domoj fariĝis fortikaĵoj kaj la tuta urbo batalkampo. Batalkampo, sur kiu batalis junuloj kaj maljunuloj, viroj kaj virinoj kontraŭ nazi-okupantoj. Ofte ne havis la defendantoj armilojn, sed ne mankis en iliaj koroj granda entuziasme, kiu ne povis sufiĉi por la venko. Tiam Radio-Praha petis senĉese pri helpo. Kaj la helpo venis ...

Matene la 9-an de majo, en lasta tago de milito, jam en periferioj de la urbo bruis sovetaj tankoj kaj la Ruĝa armeo alportis liberecon al nia ĉefurbo.

Per multaj oferoj estis savitaj la venko kaj la libereco. Ĉiujn, kiuj mortfalis en heroo batalo sur barikadoj, en ekfloranta printempo de la jaro 1945, ni neniam forgesos.

Tial la junpioniroj honorgardantaj promesas: "Ni vivos kaj laboros laŭ modelo de niaj herooj".

----- Nefermita letero -----
 NI AKUZAS KRIMON EKSTREME MALHUMANECAN de USONAJ IMPERIISTOJ en SUDVJETNAMIO
 Al la pacamaj kaj justamaj geesperantistoj en la tuta mondo!

Estimataĵ kaj karaj gesamideanoj!

Kiel de vi sciante, delonge usonaj imperiistoj starigis agresivan militon en Sudvjetnamio kaj ili ne rifuzis nenian rimedon teruran kaj barbaran por masakri la sudvjetnaman popolon, kiu postuladas pacon kaj reunuiĝon de sia Patrolando. Jam plurfoje ili uzadis toksajn ĥemiajn produktaĵojn en pluraj regionoj de Sudvjetnamio kaj per tio toksis milojn da homoj, detruis dekmilojn da hektaroj de vegetaĵoj kaj kulturaĵoj. Dum Januaro de 1963, paralele kun la intensagado de raboperacioj tra la tuta Sudo, ili dissemis seninterrompe per aviadiloj toksajn ĥemiaĵojn sur regionojn vastajn je miloj da hektaroj kaj speciale popoldensajn de la du provincoj Bentre kaj Mytho, tiel okaziginte amasan toksadon al sennombraj homoj kaj dombestoj kaj grandskalan velkiĝon al vegetaĵoj kaj kulturaĵoj. Laŭ unua informo, nur en unu vilaĝo Nhandanh ĉe provinco Bantre. 198 homoj estas toksitaj inkluzive virinojn kaj infanojn, multnombraj ĝardenoj kaj rizkampoj tieaj estas detruitaj.

La ĵusa dissemado de toksaj ĥemiaĵoj en Sudvjetnamio konsistas el ekstrema malhumaneca ago kaj plej abomenbla krimo de la usonaj imperiistoj rigarde la vjetnaman popolon kaj la tutan homaron. La agresivaj usonaj imperiistoj utiligas senhonte hodiaŭ en Sudvjetnamio rimedojn antaŭe utiligitajn de la hitleraj faŝistoj por ekstermi milionojn da homvivoj, tiaj rimedoj, jam de dekoj da jaroj, estas severe kondamnitaj de la tuta progresiva homaro kaj de la internacia leĝo.

Estas klare, ke la usonaj imperiistoj agis

malrespekte al la promesoj faritaj de la Usona Registaro konkorde kun aliaj statoj subskribinte la Kontrakton de 6-a Februaro 1922 kaj la Protokolon de 17-a Junio 1925 koncerne la malpermeson al la uzado de gazoj asfiksiaj, toksaj aŭ similaj, samkiel de ĉiaj fluidaĵoj aŭ substancoj similaj kaj de bakteriaj rimedoj. Ili grave atencis al la Genevaj Akordoj de 1954 koncerne Vjetnamion en la spirito kaj en la literoj.

La pacamaj kaj patriotaj geesperantistoj de Vjetnamio energie akuzas antaŭ la opinio de la esperantista mondo la supremenciitan krimon ekstrema barbaran de la usonaj imperiistoj. Ni fortege apelacias ĉiujn esperantistajn pacbatalantojn en diversaj landoj, ke ili agorde kun ni levu sian voĉon por akuzi kaj kondamni la sup-remenciitajn krimojn de la usonaj imperiistoj, por nepre postuli al la Usona Registaro la ĉesiĝon de la nuna agresiva milito en Sudvjetnamio kaj la tujan interrompon de la amasa masakro de la sudvjetnama loĝantaro per toksaj ĥemiaj produktaĵoj.

Ni firme kredas, ke kun la aprobo kaj subteno ĉiam pli forta de la universala esperantistaro samkiel de ĉiuj pacamaj popoloj en la mondo, niaj heroaj samlandanoj en Sudvjetnamio nepre atingos la finan venkon en sia malfacila batalo kontraŭ la agresivaj usonaj imperiistoj, kiuj estas malamiko la plej danĝera kaj plej sangavida de la vjetnama popolo samkiel de la tuta progresiva homaro.

VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO — 53 Trang thi. Hanojo, Vjetnamio

VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO /V.P.E.A./ fondiĝis la 9-an de decembro 1957. Ĝi kolektas ĉiujn pacamantajn geesperantistojn, sendepende de iliaj sociaj klasoj, politikaj tendencoj, agoj, seksoj ... por:

- Disvastigi la kulturajn rilatojn kun alilandoj per korespondado, interŝanĝo de esperantaj eldonaĵoj, celante plifirmigi la interpopolan amikecon.

Ĝia plenumkomitato konsistas el 17 membroj kun s-ro Nguyen Duc Quy, Vicministro de la Kulturo de V.D.R., kiel prezidanto.

EL LA VIZITO DE ĈEĤOSLOVAKA PREZIDENTO ANTONÍN NOVOTNÝ EN VJETNAMA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

/Uzita materialo: "Dokumentoj kaj Informoj" - aldonaĵo de "Vjetnamio antaŭenmarŝas" - n-ro 1/1963/

En tagoj de la 22-a ĝis la 27-a de januaro 1963 vizitis Vjetnaman Demokratian Respublikon la Unua Sekretario de la Centra Komitato de Ĉeĥoslovaka Komunista Partio kaj Prezidento de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko Antonín Novotný kun sia akompano.

En sia bonvenparolado Prezidento Ho Chi Minh diris:

"Hodiaŭ la vjetnama popolo multege ĝojas akcepti vin, kara kamarado Prezidento, vin kaj la aliajn altestimatajn gastojn; ni kvazaŭ akceptus la fratojn, revenintajn el malproksime. Vi venas ĉe ni, ĝuste, kiam okazas la tradicia Tetfestoj, la printempa festo de la vjetnama popolo. Tiel, kun via alveno: Pli ol iam, printempe bela estas tiu ĉi printempo. Malproksime staras montoj kaj riveroj, sed proksimaj estas niaj frataj koroj kaj granda, nia ĝojo!"



Antaŭ pli ol 100 000 loĝantoj de Hanojo. Prezidento Antonín Novotný diris: "En la konstruado kaj disvolviĝo de via lando, samkiel en la lukto por la nacia reunuiĝo vi trovas en ni fidelajn kunbatalantojn. Ni estas firme konvinkitaj, ke triumfos la ĵusta lukto de la vjetnama popolo. La popolo venkos kaj la socialismo venkos!" - En komuna deklaro, subskribita de ambaŭ ŝtatestroj estas dirite: "La ĉeĥoslovaka popolo varmege salutas sukcesojn akiritajn de la heroo sudvjetnama popolo, sub la gvidado de la Nacia Fronto de Liberigo de Sud-Vjetnamio kaj tute subtenas la politikon de Vjetnama Demokratia Respubliko en la plenumado de la Ĝenevaj Konvencioj de 1954» pri Vjetnamio, por la paca reunuiĝo de Vjetnamio."

KRAJONOJ

SPERTO

INTERPAROLADO

PLIBONIGO

En aprilo vizitis kartografistoj el Instituto por geologia esplorado krajonfabrikon Hardtmuth en České Budějovice kaj interparoladis kun produktantoj pri kvalito de iliaj fabrikaĵoj. Ing. Fr. Dech /antaŭtempe laborinta en V.D.R./ atentigis ĉiujn pri interesa sperto: koloraj grafitoj por metalaj skribiloj, per influo de tieaj klimataj kondiĉoj - varmego kaj malsekeco de aero - moliĝis tiel, ke oni povis el ili ligi nodon. Laboratoriaj

spertuloj en la krajonfabriko promesis, ke ili preparos tiajn grafitojn, kiuj restos bonkvalitaj eĉ en specialaj klimataj kondiĉoj.

Jaroslav Štěpánek

Se ni decidiĝis la plejparton de enhavo de "Informa Bulteno" dediĉi al Vjetnamio, ni faras tion por esprimi niajn simpatiojn alheroa vjetnama popolo kaj ĝia ĵusta postulo unuigi Nordan kaj Sudan Vjetnamion en unu feliĉan landon.

Memoru franjo mia

La ĉi sube publikigita versaĵo estas de THANH-HAI, sudvjetnama revolucia poeto. Ĝi estas verkita dum la gastado de la poeto en Pollando en aŭgusto 1962. Thanh-Hai estis membro de la Delegacio de la Nacia Fronto de Liberigo de Sud-vjetnamio, kiu vizitis la Demokratian Respublikon de Vjetnamio en oktobro de la jaro 1962.

N.D.L.R.

Memoru, franjo mia, la haro-fasketojn patrinajn
Ĵetitajn en la amason da tiuj elrazitaj haro-fasketoj,
Memoru la noktajn plorojn de buboj frostotremantaj
Kies ŝuojn oni forprenis senkomplete.

Gravuru en vian memoron tiujn ostaĵojn tute blankajn
Tiujn makzelojn, tiujn kraniojn senorde amasigitajn,
Tiujn terurajn fornojn, kie oni bruligis la homojn,
Tiujn karcerojn, kie oni frakasis la senkarnajn korpojn.

Memoru, franjo mia, memoru
Eĉ se hodiaŭ la floroj naskiĝas sur tiu loko
Se la ĉambroj heliĝas kaj la suno radias,
Memoru la sangon, kiu ruĝiĝis tiun teron.

Memoru ĉion tion, sed for de vi la penso,
Ke por ĉiam malaperis masakroj kaj mortigoj,
O franjo Polujo, respiras la feliĉon lando via,
Sed dronas en karbardaĵo kaj en sango la mia.

Denove patrinoj niaj havas la harojn bruligitaj,
Niaj infanoj kriante sian malsaton ruladas sur la tero,
La ŝtalaj kaskoj vagadas antaŭ niaj pordoj,
La terura fusil-okulo fiksas nin en premsonĝo.

Oswiecim, lando mia, ho ve
Kovras sin per dekmiloj da aliaj Oswiecim,
En sennombraj koncentrejoj, sputege
La sudvjetnama sango kontinue fluadas.

Kaj tamen kreu min, franjo mia,
Kreu tiel firme kiel antaŭe la patrinoj agoniantaj
Mia lando jen ĝi proteste staras nevenkebla
Samkiel la via tion faris dum aliaj tempoj.

/Oswiecim, la 13-an de aŭgusto 1962/ THANH

HAI

Esperantigita de DAO ANH KHA

Represita el "Vjetnamlo antaŭenmarsas", n-ro 1/1963

TELEGRAMO

AL VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO, 53 Trang thi, Hanoi-Vjetnamio

KARAJ AMIKOJ – ESPERANTISTOJ

KUN LA KOMPreno POR SUfero DE VIAJ FRATOJ EN SUDVJETNAMIO NI LEGISVIAN LETERON KAJ KONDAMNAS LA KRIMOJN, FARATAJN KUN PRETEKSTO, KE ONI PROTEKTAS LA LIBERECON KAJ LA DEMOKRATION.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

Niaj vjetnamaj amikoj sendis al ni nefermitan leteron, kies plenan tekston ni represis.

La enhavo de tiu ĉi letero estis pridiskutita en nia kluba kunveno kaj de ĉiuj ĉeestintoj estis kondamnita la nuna agresiva milito en Sudvjetnamio, en kiu oni uzas eĉ toksajn ĥemiaĵojn, per kiuj estas detruataj la vjetnama popolo kaj eĉ la tuta vegetaĵo.

La militon, starigitan kontraŭ la patriota movado, instigas kaj gvidas imperiistoj, kiuj subtenas putran reĝimon de Ngo-djnh-Diem, kiu ebligas al ili ekspluati la sudvjetnaman popolon kaj naturan riĉecon de la lando.

Ŝtata sekretario de Usono Dean Rusk mem konfesis la 22-an de aprilo en sia prelego en ekonomia klubo de Nov Jorko, ke kune kun soldatoj de Ngo-dinh Diem batalas 12 000 anoj de usona armeo. Ĉeesto de Usono en tiu ĉi agresiva milito motivigis Rusk per "vivneceso de Sudvjetnamio por prospero kaj sekureco de libereco en la mondo".

Membroj de Esperantista klubo en Praha alvokas ĉiujn esperantistajn klubojn kaj rondetojn en Ĉeĥoslovakio, por ke ili konatigu inter siaj anoj la leteron de vjetnamaj esperantistoj - pacdefendantoj kaj ke tiuj en sia privaa korespondado sciigu la eksterlandajn korespondantojn kun barbaraj agoj de sudvjetnama diktatoro kaj liaj imperiismaj kunuloj. En sian korespondadon metu "Informan Bultenon". Bezonatan nombron da "IB" laŭ peto ni sendos al vi.

La Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato akceptas la alvokon de la Esperantista Klubo en Praha kaj aldonas sian proteston kontraŭ la ĥemia milito starigita de imperiistoj en Sudvjetnamio.

Ni petas gvidantojn de Esperanto-rondetoj, por ke ili anoncu al jena adreso : CSEK,Blanická 4, Praha 2, ĉu ili la alvokon de la Esperantista Klubo en Praha pridiskutis en siaj kunvenoj kaj al kiuj kluboj aŭ unuopuloj en eksterlando ili forsendis "Informan Bultenon".


František Sviták, sekretario

D-ro Jaromír Jermář, prezidanto

DU DONACOJ

Ĉeĥoslovaka malsanulejo en HAI PHONG

En vjetnama havena urbo Hai-phong konstruis Ĉeĥoslovakio modernan hospitalon kiel donaco de ĉeĥoslovakaj laboristoj al vjetnama popolo. En la malsanulejo jam ŝanĝiĝis kelkaj dekoj da ĉeĥoslovakaj kuracistoj kaj hospitala personaro. Bona nomo de ĉeĥoslovaka medicina scienco kaŭzis, ke pli poste estis CSSR petita helpi dum fondo de la unua fakultato en Vjetnama Demokratia Respubliko.



Tiel opinias la sudvjetnama popolo pri la usona "milithelpo". Levitaj pugnoj de sudvjetnama kamparano ne povas malebligi starton de aviadilo, kiu alportas ruiniĝon al la rikolto.

Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio startas aviadiloj super kampoj, ne por ke ili ruinigu la vegetaĵon, sed ĝiajn parazitojn. En unu tago eĉ super sudvjetnamaj kampoj ekflugos aviadiloj, kiuj helpos renovigi ĉion ruinigitan en tempo de "agresiva milito".

NIA KORESPONDANTO SKRIBAS AL NI

La redakcejo ricevis multajn leterojn kaj salutojn el eksterlando.

Samideano Roman Sakowicz al Pollando skribis al ni:

Nowa Sól la 27.4.63

Al Esperantista Klubo en Praha!

Mi tre dankas pro alsendo de la n-ro 1 de via Bulteno. La informo de s-ro Ivan Seleznev rememorigis al mi la unuajn tagojn de mia esperantigo, kiu okazis en 1904 jaro.

Mi tiam loĝis en Peterburgo, sed mi aŭdis pri s-ano Seleznev, kiu mortis en la jaro, kiam mi esgerantiĝis. Li estis fama pro sia vojaĝo tra la mondo. Interalie li estis en Parizo, kie li interparolis kun Carlo Bourlet, kiu la unuan fojon interparolis kun alilanda esperantisto en nia lingvo. La pariza grupo organizis tiam festeneton en Café Voltaire en la honoro de Seleznev kaj jen kion poste skribis pri li C. Bourlet:

"tiu asketo, kun sia longa, griza palto, kies kolumo estis ĉiam levita, estis la unua eksterlanda esperantisto, kun kiu mi parolis en Esperanto. Mi bone memoras lian flaman paroladon, la fluantecon de lia esprimado, kiu min mirigis."

Interalie Seleznev komencis kampanjon por fondo de Esperanta Akademio.

Bedaŭrinde mi ne trovis lin inter la membroj de la unua esp. registrita en 1898 societo esp. "Espero" en Peterburgo, kie mi estis membro de 1904 jaro. Al tiu societo estis sendita en 1892 jaro la unua esp. telegramo de d-ro L. L. Zamenhof kun vortoj: "benitan komencon, kreskantan potencon en floro kaj gloro deziras el koro Zamenhof."

Nun inter vi vivas unu estinta ano de tiu societo, kiun mi en estinta jaro renkontis en Praha, vojaĝante al Budapeŝto.

Bonvolu lin saluti kaj ankaŭ ĉiujn membrojn de Praha-Klubo, kiuj memoras min. Eble en tiu ĉi jaro, se mi vojaĝos al Kongreso en Sofio tra via urbo, mi denove vidos viajn klubanojn!

Ĝis la revido kaj ĉion bonan deziras al vi

Roman Sakowicz

Esperanto

EN ĈEĤOSLOVAKA PRESO

Ek de la jaro 1955 kolektas nia klubo ĉiujn artikolojn, kiuj aperas en la ĉeĥoslovaka preso. Dum tiuj jaroj originis en niaj manoj interesa kolekto, enhavanta 350 da tiuj artikoloj aŭ mencioj pri Esperanto el disaj gazetoj /ekz.: Rudé Právo, Lidová Demokracie, Svobodné Slovo, Večerní Praha, Mladý Svět, Rovnost, Jiskra ktp./

En biblioteko de nia klubo estas je dispono eĉ pli malnovaj, neregule kolektataj artikoloj. Dum la pasinta jaro 1962 ni envicigis 21 artikolojn aŭ menciojn pri Esperanto, kiujn ni eltranĉis el 8 diversaj gazetoj.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj aperintaj artikoloj trovis sian lokon en nia kolekto, ĉar nur multo da homoj povas legi multon da gazetoj. Tio signifas, ke ni bezonas pli multe da kunlaborantoj. Tial ni petas vin, samideanoj: Helpu al ni kaj ĉiun aperintan artikolon pri Esperanto vi sendu afable al nia adreso: "ESPERANTO", P.B. 1108, Praha 1.

ĈU VI SCIAS

ke Lev Ŝejnin, kiu siatempe kiel juĝisto reprezentis sovetunian juron kaj ankaŭ la ĉeĥoslovakon, dum la funkciado de Tribunalo en Norinberko skribas en sia verko "Notlibro de kriminalisto" pri Esperanto? Sur la 12-a paĝo de ĉeĥa eldono de tiu libro ni legas: „En Komsomol-klubo oni kantadis "Juna gvardio de laboristoj kaj kamparanoj" kaj lernis Esperanton, por akceli alvenon de tutmonda revolucio per efektivigo de unueca lingvo por proletaro de ĉiuj landoj.

VERDSTELA BULTENO, organo de la Bristola Esperantista Societo. En la n-ro 23 (januaro-februaro 1963) ni legas legendon pri hebrea getto kaj Golem kaj Rabbi Löw, kiun ĉi tiu Bulteno ĉerpas el "Gvidlibro-Praha", siatempe aperinta.



Nigra elefanto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo – J. Šustr
Trifoje de Vries

En la ejo de Esperanta biblioteko el Nederlando. Alskribit klarigo diras, ke ĝin donacis samideano Jan de Vries el Leuwarden. Tiu samideano antaŭ longaj jaroj kun sia edzino vizitis nian urbon, postlasis ĉi tie agrablajn rememorojn, kiujn li ĉiujare refreŝigas per donaceto en formo de kalendaro. En lastaj du jaroj ni ne plu lotumis pri tio al kiu ĝi apartenu, sed ni ornamis per ĝi muron en la ejo, kie troviĝas literatura trezoro por ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Tiun ejon vizitis jam multaj gastoj el landoj eĉ tre malproksimaj. Jam 26 flagetoj, hisitaj sur la ŝrankoj, nin instruas, el kiuj landoj la gastoj venis: Argentino, Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Dalando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Kubo, Nederlando, Pollando, Sovetunio, Estona SSE, Litova SSE, Svedujo, Svislando, Usono, Vjetnamio kaj kompreneble ankaŭ Ĉeĥoslovakio. Reprezentantoj de 26 nacioj, dum nuraj du jaroj.

En la memorlibro kreskas nombro de enskriboj. Inter tiuj, kiuj en la lasta tempo vizitis la bibliotekon, ni ree legas la nomon Jan de Vries. Sed ĉi tiu estas alia de Vries! Do jam la dua en la vico hodiaŭ. En la memorlibron li skribis 15.8.1962 jene:

"Estante en Praha, mi kompreneble ankaŭ vizitis vian bibliotekon. Multon mi aŭdis pri ĝi de mia mortinta amiko Andreo Volko. Bedaŭrinde li ne ĝisvivis mian viziton, ĉar antaŭ monato, la 16-an de julio li mortis. Vi komprenas, ke tial mia vojaĝo perdis la plezuron. Tamen la vizito al Praha tre ĝojigis min. Mi nur trovis afablajn kaj sindonajn homojn. Speciale s-inon Bárochová mi elkore dankas pro la gvidado tra Ora Praha. La enhavo de esperanta biblioteko min tre surprizis. Ion tian mi ankoraŭ ne vidis. Ĝi gvidu nin al la

venko! Esperante, ke mi baldaŭ povos reveni, mi finas.

Jan de Vries el Benswoud.

Ĉi tiu simpatia ĵurnalo estis tiu, kiu informis min pri la forpaso de nia membro Andreo Volko. En Bánská Bystrica, kien Volko el Praha transloĝiĝis, li tuj komencis labori por Esperanto. Ni estis en vigla koresponda rilato. En julio okazis, ke presaĵo, de mi al li sendita, revenis kun stranga rimarko, ke la adresito ne plu uzas tiun adreson. Mi do supozis, ke Volko eble transloĝiĝis, kaj forgesis informi poŝton pri sia nova adreso. Anko- raŭfoje mi provis per la poŝto enmanigi al li sendaĵon de menditaj propagandiloj, sed ankaŭ tiu revenis. Sam-tage mi ricevis leteron el Nederlando en kiu Jan de Vries turnas sin al mi, delegito de UEA, kun servopeto, kaj samtempe min informas, ke inter li kaj mortinta Andreo Volko estis amikeco, kaj interkonsento, ke li, Vries, nunjare vizitos lin, kaj venontjare Vries gastigos Andreon en Nederlando. Sed nun, kiam Andreo mortis, li volus almenaŭ viziti lian tombon en malproksima Bánská Bystrica... Kiel malgranda estas la mondo! El Nederlando mi sciigis pri morto de ŝatata amiko kaj membro de nia Klubo, kaj lia nederlanda korespondanto venas el tiu malproksima lando por almenaŭ viziti tombon de sia amiko! Ĉu io simila okazas ankaŭ inter neesperantistoj?

En kvara numero de slovaka cirkulero "Esperanto" mi legas belan nekrologon el plumo de d-ro Izák: METEO- RO! Vere, kiel meteoro ekserenis verda lumo de Volko, kiam eklaboris en Slovakio. Kiel meteoro li estingigis. Jan de Vries estis tiu, kiu nin informis pri tio, kaj kiu vizitis nian bibliotekon.

Hodiaŭ mi havas ankoraŭ unu samnomulon. Estas jam la tria de Vries. Ĝuste estus, se mi estus citinta lian nomon unualoke, ĉar li vivis jam antaŭ tre, tre longe. Li estis la unua el tiuj tri de Vriesoj, kiuj venis en la proksimecon de tiu malbela domo ĉe "Nigra Elefanto". Estis la fama skulptisto, gravuristo kaj metalfandisto Adriano de Vries. - La 25-an de oktobro jaron 1601 li estis ĉi tie ĉeestante la enterigon de Tycho Brahe. La ceremonion partoprenia la tuta reĝa kortego en kles medio Adriano de Vries vivis. La reĝo Rudolfo II-a ankaŭ estis tie. Pri

tio mi skribis en nia Bulteno n-ro 62. La loko kie situas tombo de Tycho Brahe, estas eĉ ne cent paŝojn de nia biblioteko. Adriano de Vries ĵus en tiu jaro /1601/ nove revenis al Praha. La reĝo kaj imperi-estro Rudolfo la II-a tre sincere invitis lin, pagis al li pli grandan parton de sia ŝuldo kaj samtempe garantiis al li regulan salajron. Tion konsente akceptis ankaŭ la ĉeĥa nobelaro. Adriano de Vries revenis al Praha kun granda plezuro. Li ja kelkfoje jam ĉi tie laboris. Sed nun li jam en Bohemujo restis, neniam ĝin forlasinte. Reĝa kortego ĉeĥa donis al li multe da okazoj disvolvi sian artoplenan talenton skulptan, al kiu man-en-mane ariĝis neimiteblaj kapabloj en metalfandado. Longa estis vico de statuoj kaj figuroj, kiujn li kreis. Liaj tri bustoj de Rudolfo fariĝis mondkonataj ankoraŭ dum la vivo de de Vries. Famega artisma galerio de Rudolfo fieris pri multaj bronzaĵoj portretoj, statuoj kaj figuroj el metalfandado de Adriano de Vries. Sed post la tridekjara milito-1618-1648-nenio el ili restis en Praha. Artoplena galerio de

ATENTIGO!

Nia sekretario, s-ano Pražák, havas multe da laboro kun respondoj al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri nia klubo, pri niaj programoj ktp.

Tial ni konsilas: legu atente nian "Informan Bultenon", en kiu vi trovos gravajn informojn!
Redakcio

Sur la fotografiaĵo vi vidas la novan klubejon de Esp.-rondeto en Praha, kiu troviĝas en Řeznická strato 17, Praha 1; telefonnumeron 22 65 14 vi povas uzi ĉiuvendrede de la 20-a ĝis la 22-a horo.

NI ELKORE INVITAS ĈIUJN!

Rudolfo kies famo dum kelkaj jardekoj iris tra la mondo, estis komplete elrabita: Armeo de Konigsmark forportis ĝian plej grandan parton kiel militan kon-kerajaĵon en Svedujon. Ankoraŭ hodiaŭ multaj el la verkoj de Adriano de Vries troviĝas tie en la parko de Drottningholm.

Jardekoj kaj jarcentoj pasis kaj en daŭro de ili unuopaj juveloj el la laborejo de Adrijano venis ankaŭ en aliajn urbojn eŭropajn /Roma, Vieno kaj aliaj/.


En Praha, en la palaco de Walenstein, vekas admiron kelkaj majstroverkoj de tiu eminenta artisto. Sed ili ne estas jam originalaj. Estas nur kopioj tre bone faritaj laŭ tiuj, kiuj troviĝas en Svedujo.

Vizito de unu samideano de Vries rememorigis al mi viziton de lia samnomo. Nun estis jam nur paŝeto por rememori plian samnoman, sed historian personon, kiu ankaŭ foje aperis en la proksimeco de "Nigra Elefanto", sed antaŭ 361 jaroj.

Ĝis la 30-a de aprilo renovigis sian membrecon en nia klubo 183 samideanoj, kiuj nun konsistigas ĝian kunon.

Plialtiĝis meznombro de klubaj ĉeestantoj el 32 /1962/ al 48 /1963 - januaro-aprilo/.

Certe ĝojiga konstato.



J. Ondráček: L A K L U B E J O . . .

Preskaŭ regule nd. vizitadas kunvenojn de Esperantista Klubo en Praha. Jam kelkajn jarojn. Kaj pro tio mi sentas ĉiumerkrede devon iri en Smečky kaj esti du horojn inter konatuloj, inter esperantistoj. En tiuj ĉi kunvenoj, krom planitaj programoj okazis de tempo al tempo grumblado kontraŭ nia kunvenejo, oni pri tio diskutis, sed rezulto estis ĉiam la sama: verejii bezonus pli bonan kunvenejon, sed ĝi ne estas havebla. Post tia rezulto ni vole ne vole trankviliĝis por kelkaj semajnoj. Tio okazis kelkfoje dum la jaro.

Ĉar malkontenteco kaj deziro havi ĉiam pli multe helpas al progreso, ankaŭ mi partoprenadis la diskutojn je tiu ĉi terno.

Bedaŭrinde el ĉio tio restis nur debatoj de ĉeestantoj. Kaj kun tia ago oni ne povas konsenti. Sed kiamaniere paroligi aliajn, se mi mem timas malfermi diskuton antaŭ publiko.

Ankaŭ tiu ĉi jare, ankoraŭ en februaro mi iradis regule en Smečky. Kaj jen. Unu merkredo estis la lasta, kiam mi iris tien. Prezidanto de la klubo anoncis, ke jam venontan fojon li bonvenigos nin en tute nova klubejo. Laŭ la anonco mi eksciis, ke ĝi estas iama restoracio kaj nun ke ĝi apartenas al uzina klubo. Tiun merkredon oni multe parolis pri nova kunvenejo, sed neniu povis ĝin kritiki, ĉar krom la prezidanto neniu el ni ĝin vidis.

En vigla parolado pasis du horoj kaj precize je la 22-a venis dommastro kaj kriis: "Bonan nokton". La prezidanto finis la kunvenon per vortoj: "Ĝis la revido, venontan semajnon, vendrede en nova kunvenejo, ne forgesu!"

Post la semajno, merkrede, mi ne sciis, kion fari. Longan tempon mi rezervis merkredajn vesperojn por esperantistaj kunvenoj. Mi vagis tra stratoj kaj kutime mi venis en Smečky, kie mi anaŭ la estinta klubejo hazarde renkontis du samideaninojn, kiuj ne science pri okazintaj ŝanĝoj, venis kiel ĉiam en la klubon kaj estis tre surprizitaj, ke neniu estas tie. Mi klarigis al ili la situacion kaj invitis ilin en la novan klubejon.

Post du tagoj mi denove iris en la esperantistan kunvenon. Mi estis tre scivolema, kvankam mi bone konis ĉir- aŭaĵon de la nova kunvenejo, en kies proksimeco mi antaŭtempe loĝis. Estinte tiam pli juna mi ne vizitadis gas- tejojn kaj restoraciojn. Sed laŭ la ne novaj domoj, kiuj estas situataj ĉirkaŭe, kvankam la kvartalo nomiĝas "No- va Urbo", mi dubis pri sukcesa ŝanĝo de la kunvenejo.

Facile mi trovis ĝustan straton kaj, ĉar mi havis ankoraŭ tempon, mi malrapide promenis tra la strato, rigardis domojn, kaj supozis, ke mi trovos la klubejon laŭ signoj de iama restoracio, ĉar nun, kiam mi estas pli aĝa, mi jam konas aspekton de gastejoj ekstere kaj interne. Trairinte la straton, mi trovis nenion similan. Do, mi iris reen kaj rememorigis numeron 17. Mi trovis ĝin, sed mi ne kredis, ke en tiu domo povis esti eĉ iam restoracio. Mi rigardis en mian kalendaron, kien mi notis pasintsemajne adreson. Sed en ĝi estis skribita la numero 17. Trairinte modernan vitran pordon, mi haltis sur ŝtuparo, kiu gvidis min en la kunvenejon. Kiel scivolema esploranto mi eniris ... kaj jen! Eble estos pli bone, se vi rigardos la foton, aŭ se vi venos kaj rigardos mem la klubejon. Vi estis vere surprizita. Belega salono, agrabla temperaturo, ĉio brilas de pureco. En garderobo mi pendigis mantelon kaj en apuda ĉambreto mi trovis kelkajn gesamideanojn en konversacia rondeto. Mi ne volis ilin ĝeni kaj pro tio mi revenis en la salanon, kie mi trovis sur tabloj krom cindrujoj ankaŭ vazojn kun floroj, kaj en angulo starantan tableton kun nova radioaparato kaj gramofonŝrankon. Kia vere agrabla medio. Precize je la 20-a horo malfermis la prezidanto la unuan kunvenon en Řeznická strato 17.

Nun mi jam al kutimiĝis vizitadi regule vendrede novan kunvenejon, kiu jam estas por ni ĉiuj memkomprenebla. Kaj kio nun?

Pri tio mi ankoraŭ skribos al vi.

Dum niaj kunvenoj en la jaro 1963 ni jam povis bonvenigi en nia klubejo gastojn el Danlando, G.D.R., Pollando, Svedujo kaj Kubo, krom multaj gastoj el aliaj urboj en Ĉeĥoslovakio.

/mal/-

En internaciaj kunvenoj oni interkompreniĝas per kantoj kaj per gestoj. Tiel parolas la artikoloj pri internaciaj kunvenoj de junularo. Sed tio ne sufiĉas al inteligentaj homoj, kiuj volas vere interkompreniĝi, ne helpas gestoj. Gesto restas gesto, senvarma, senkora. Ni esperantistoj, havas avantaĝon, ĉar ni havas ilon por interkompreniĝi kun homoj de ĉiuj nacioj. Kaj, tamen venas momentoj /kaj tiuj ĉi momentoj ekestas eĉ dum interparolo en gepatra lingvo/, kiam ni havas preskaŭ kapon malplenan. Kiel savanto venas prefikso -mal-, ni ne scias nocion "nigra", do simple ni diras "malblanka", kaj certe ni estas komprenataj. Prefikso -mal- montras ideon logike kontraŭan al tiu, kiu montras radiko: "longa-mallonga", "plena-malplena", ktp. Multaj esperantistoj opinias, ke "mal-vortoj" estas negativaj. Sed ne estas tiel; "mal-vortoj" estas tiel pozitivaj, kiel radikoj: "bela-nebela-malbela", negativa estas tiu "nebela", sed "malbela" estas pozitiva, ĉar ĝi estas pozitiva /kontraŭo de bela/.

En embaraso -mal- estas tre utila /anstataŭ gestoj/, oni povas uzi "malplafono" aŭ "malplanko", laŭ okazo, kiun vorton ni kaptas en la memoro, ekz. "maltago", "malnokto", "maltrinki

Eĉ poete oni uzadas la prefikson -mal-. Mi rememoras karan d-ron Kamarýt, kiam li skribis al ni poeme dum E-kolegio en Kost: "Vi, kiuj kuraĝe malsilentis!"

Prefikso -mal- ligiĝas al radikoj substantivaj, adjektivaj kaj verbaj; "lumo - mallumo", "longa - mallonga".

En moderna Esperanto oni anstataŭigas "mal-vortojn" per neologismoj, por ke ili ne abundiĝu en teksto; ekzemple: maldolĉa - AMARA, malĝojigi - AFLIKTI, malpaci - KVERELI, malseka - HUMIDA /pri tero/, maluili - NOCI, malofte - RARA, maltima - AŬDACA, malprogresi - REGRESI, malmola - DURA, malatente - NEGLEKTE, malŝpari - DISIPI, malgaja - TRISTA, malluma - OBSKURA, malbona - MISA/pri nekompreno/, malhelpo - OBSTAKLO, malĉasta - LASCIVA, malafabla - MOROZA, malgrasa - MAGRA, maldika -

DINA, maljuna - OLDA, mallonga - KURTA /kurtaj ondoj?/, malvarma - FRIDA.

Kaj tamen -mal- restos fidela helpanto al vojaĝemaj esperantistoj.

ARTA PROGRAMO EN NIA KLUBO

La 9-an de majo festis nia popolo 18-an datrevenon de liberigo el nazi-okupacio.

Nia klubo rememoris tiun ĉi datrevenon la 3-an de majo per speciala programo. S-ano Rudolf, prezidanto de la klubo, parolis pri signifo de tiu ĉi tago kaj pri rolo de Esperanto kaj esperantistoj en la porpaca batalo. La artan programon prezentis infana muzika kolektivo el Popola lernejo de arto en Praha-Smíchov, sub gvido de prof. Procházka. Niaŭdis inter alie Sonatinon por tri violonoj de Jitka Smrčková, Duon de Jan Křitel Vaňhal kaj Gavoton por tri violonoj de Antonín Dvořák. Ĉeestintoj dankis al la infanoj per granda aplaŭdo.

La 24-an de majo ni havis okazon bonvenigi en nia klubo s-anon R.Torriente el Kubo, kiu varme salutis ĉiujn ĉeestantojn. La intervjuo kun la ŝatata gastoj ni represos en la venonta numero de "I.B."

Slovaka esperantisto Aloiz R. KREMER ĝisvivis la 29-an de majo sian 20-an naskiĝdatrevenon. Okaze de tiu ĉi vivjubileo ni sincere gratulas kaj deziras al s-ano Kremer ĉion plej bonan.

Mi esprimas per tiuj ĉi linioj dankojn al niaj geklubanoj Helena Brotánková kaj Vladimír Pražák, kiuj dediĉis multajn horojn el sia libera tempo por retajpado de manuskriptoj kaj la fina muntado de tiu ĉi "Informa Bul-teno" por presejo.
Miloš Rudolf

La titolan paĝon de tiu ĉi numero de "IB" desegnis nia membro D. Bartošik.

La redakcio pardonpetas la legantojn, ke en la numero 1/63/ de Informa Bulteno sur la titola paĝo super la ĉefa artikolo ne estis represita la faksimilo de hispana gazeto "ESPERANTO". La eraro estis kaŭzita en la presejo.

Redakcio

KORESPONDANTO

POLLANDO

Anoj de koresponda kurso volonte respondus kun ĉeĥoalovakaj anoj. Skribu al: Georgo MICH, Swiat 27, PZE, Warszawa, P'

Elena SPASOVA IVANOVA, v.Lehĉevo, Mihajlovgrad, Bulgarlo, deziras korespondadi.

KOCI MATEV KOCEV, 03eneo, Razgradsko, Bulgario, deziras kr, pri ĉiuj temoj.

ĈEĤOSLOVAKIO:

J. PLÁTENÍK, tĥ.gen.Svobody 3, Kromĉříĝ, ĈSSR, deziras kor. pri libroj kaj filmoj, interes.

IK .ktp.kun junaj esperantistoj el Italujo, Hispanujo, Usono, Pollando, Kanado, Germ.Dem.Rep. kaj al.

En nordaj landoj: Svedujo, Norvegujo, Danlando kaj Finnlando serĉas gekorespondantojn s-ro Miroslav SMOTLACHA, Stoĝicka 606/11, Vodĥany, ĈSSR.

BEĈKA Jaroslav, Řiĉany 11/219, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun c.l. pri diversaj temoj.

Kryĝtof OPAVSKÝ, Práĝková I/III, Olomouc, CSSR, deziras korespondi kun Jugoslavio.

JAPANUJO:

KEIICHI SUZUKI, 30 Kumegawa, Higashimurayma Machl, Kitatama-gun, Tokio, Japanujo, 14—jara lernanto dez.kor.

KYOKO OWAMOTO, 104 Miyasita.Yugawara-Machi, Kanagawa-Ken, Japanujo, 26-jara instruisto deziras korespondi.

JUGOSLAVIO :

Internacia societo de arkitektoj kaj konstruistoj-esperantistoj /mallong-igo: I.S.A.K.E./ regule okupiĝas pri ĉiuj demandoj kaj solvoj de konkreta internacia faka kunlaboro pere de lingvo internacia kaj ĝia kontaktad- reso: Zagreb I, Kraĝova 27/IV, Jugoslavio, ark.Vladimiro

STRUCELJ. Respondo garantiata kontraŭ internacia respondkuponon.

Esperanto-kursanoj en P ĉio deziras korespond Rada MIEJSEOWA, ZZK - T- Warszawa, ul. Targows .uhdo.

Gekorespondantojn p . kaj gelernantoj serĉas PILIPCZAK, ul. Czamieckiegc . 7, Ostróda, Pollando.

Gvidantino de Esperanto-kurso disponas je 22 adresoj de siaj gekursanoj kiuj volonte korespondus „pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝus poŝtkartojn, diskojn kaj bildkartojn. Skribu al: Stanislawa MAJERCZAK, Kroŝcienko n/D, ul. Kingi nr 6 71, Pollando.

Danuta DARGACZ, Gdańsk 9 ul.Przybnezna JO/J, Pollando, 14-jara, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

Esperantistoj, kiuj intencas viziti Pollandon Skribu al: Agr.ing.Zdislaw GLAJCAR, Cieszyn, Skrytka 3, Pollando.

SOVETUNIO :

LOGVINOVICĤ Eduard Grigorgijeviĉ, Leningrad F-180, ul.Dzeroinskogo 73,kv.26, Sovetunio, serĉas detalan vortaron esperantorusan, eble„esperanto-anglan, germanan, polan, ĉeĥan aŭ en /alia slava lingvo. /

Zeonila PIVOVAR, str.Kuprin no 10 e-4 Cbmelnickij, USSR, 40-jara instruist-ino deziras korespondi.

SVEDIO:

N.RSNNBXCK, ”””rjedalsgaten 6,Valling- by-Stockhglm ' edujo, korespondi dez. pri inters. de PM kun tutá Europo. Z'

URBA TURISMA OFICEJC BINGEN - REJNO /Bingen am^ Rbein/ Okc. Germ. volonte sendos al du esp. Interesulo beleg- an koloran faldprospekton pri urbo.

"INPORMA BULTENO" de fakrondeto de Esperantista klubo en Praha ĉe Obvodní kulturní dŭm ONV 1, Praha Respondeca: Miloĝ Rudolf. Aperas laŭbezone. Adreso: "ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio